Monata revuo en Esperanto - Maandelijks - 2060 Antwerpen - erkenningsnr. P005584 - ISSN 0772-456 X

Monato

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

**Article traduit** par Marie Anne Le Meur pour L'Air et Moi






MARIE ANNE LE MEUR

*Fino de tago post lernado pri poluado en la lernejo San Francesco en Aosto, Italio.*

FRANCE

# La jeunesse actrice de la qualité de l'air dans le monde

Marko **Gallardo**
korespondanto de Monato en Francio

La pollution de l'air est un enjeu majeur de santé publique pour tous les pays du monde et de nombreuses régions sont affectées par ce fléau. Les concentrations chroniques et les pics de pollutions (dioxyde d'azote, particules en suspension, ozone…) sont responsables de maladies (asthme, pathologies cardio-vasculaires, cancers…), diminuent l'espérance de vie (9 millions de morts prématurés dans le monde chaque année), fragilisent la santé des végétaux… Pour inverser la tendance, la Fédération L'Air et Moi déploie le programme L'Air et Moi dans le monde, en partenariat avec AtmoSud qui le déploie en région Provence-Alpes-Côte d'Azur, en France.

L'Air et Moi est né en 2009 et a été créé à l'initiative de Victor Hugo Espinosa. Ce dispositif, conçu en coopération avec des scientifiques et des enseignants, est un ensemble d'outils pédagogiques et interactifs (diaporamas, quiz, guides, travaux pratiques, vidéos, BD, jeux de rôle…), téléchargeables gratuitement , destinés aux enseignants, parents et animateurs. Ludique et dynamique, L'Air et Moi place le jeune public (écoliers, collégiens, lycéens…) au cœur des débats, tout en présentant les causes et les effets de la pollution de l'air, mais aussi les solutions pour ouvrir les horizons et dépasser la dimension anxiogène qui serait contre-productive.

Aujourd'hui, plus d'un demi-million d'enfants ont bénéficié du programme L'Air et Moi et plus de 500 adultes ont été formés. Le module « L'essentiel » du programme a été traduit en 14 langues, et nous sommes fiers d'avoir accueilli sur notre site récemment la version « Esperanto » grâce à Marc Gallardo, son traducteur (airandme.org). Le projet représente un important investissement humain et financier au bénéfice des collectivités, enseignants et animateurs de la région. Tout est mis en place pour faciliter l'accès et le déploiement du projet sur votre territoire.

**Contact :** Marie Anne Le Meur, directrice de L'Air et Moi : marieanne.lemeur@airandme.org




MARIE ANNE LE MEUR

*Fino de tago post lernado pri poluado en la lernejo San Francesco en Aosto, Italio.*

FRANCIO

# Gejunuloj lernas pri la aerkvalito

Marko GALLARDO
korespondanto de Monato en Francio

Dum la pandemia krizostato oni konstatis, ke la plimulto de la poluantoj malpliiĝis pro la foresto de trafiko. Ke la aero gravas por nia sano, ne estas malkovro de la lastaj monatoj. Jam dum pluraj jaroj, diversaj asocioj batalas por klerigi surloke pri tiu temo. Nia korespondanto Marko Gallardo intervjuis en Marsejlo la direktorinon de la asocio *L'Air et Moi* (La aero kaj mi), Marie Anne Le Meur, kiu laboras pri aera poluado.

Aera poluado estas ĉefa publika sanafero por ĉiuj landoj de la mondo, kaj multaj regionoj estas tuŝataj de ĝi. Daŭraj koncentriĝoj kaj pintoj de poluado (nitrogena dioksido, ŝvebantaj partikloj, ozono kaj aliaj nocaĵoj) responsas pri malsanoj (astmo, kardiovaskulaj patologioj, kanceroj ktp), mallongigas la vivon (9 milionoj da antaŭtempaj mortoj en la mondo ĉiujare) kaj nocas la sanon de plantoj. Por inversigi la tendencon la asocio *L'Air et Moi* disvolvas la programon „Aero kaj mi” ĉirkaŭ la mondo, partnere kun *AtmoSud*, kiu kreskigas ĝin en la sud-franca regiono Provenco-Alpoj-Lazura Marbordo.

## Dialogaj iloj

*L'Air et Moi* estis kreita en 2009 laŭ la iniciato de Victor Hugo Espinosa. Ĉi tiu projekto kunlaboras kun sciencistoj kaj instruistoj por provizi aron da instruaj kaj dialogaj iloj (bildoprezentoj, kvizoj, gvidiloj, praktikaj laboroj, filmetoj, komiksoj, rolludoj ktp.), kiuj estas senpage elŝuteblaj kaj destinitaj al instruistoj, gepatroj kaj animantoj. Ludema kaj dinamika, *L'Air et Moi* lokas junulojn (bazlernantojn, mezlernantojn, gimnazianojn kaj aliajn) kerne de la debatoj, kiuj prezentas la kaŭzojn kaj efikojn de aera poluado, sed ankaŭ solvojn por malfermi horizontojn kaj preterpasi la malserenigan dimension, kiu estus kontraŭproduktiva.

Hodiaŭ pli ol duonmiliono da infanoj profitis la programon kaj pli ol 500 plenkreskuloj estas trejnitaj por ĉi tiu celo. La modulo „Fundamento” de la programo estas tradukita en 14 lingvojn, kaj lastatempe aperis versio en Esperanto en la retejo *airandme.org*.

La projekto reprezentas gravan homan kaj financan investon avantaĝe al kolektivumoj, instruistoj kaj animantoj en suda Francio. Ĉio estas farata por faciligi partoprenon en la projekto kaj ĝian disvastiĝadon. ■